# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 2/1995 MARTO-APRILO


## TAGORDO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE SES

### EN LUCERNO, HOTELO STEGHOF

### SABATON LA 11an DE MARTO 1995, EKDE 10h00

1) Elekto de la tagprezidanto kaj voĉnombrantoj.
2) Aprobo de la protokolo de la lasta ĝenerala kunveno. (Ne relegota).
3) Komunikoj de la prezidanto.
4) Morala kaj financa raportoj.
5) Diskuto kaj aprobo de la raportoj.
6) Anstataŭigo de eksiĝinta estrarano. (Kandidato: Angelo Mellini).
7) Modifo de la statuto.
8) Elekto de la UEA-Komitatano. (Kandidatoj: Neniu).
9) Diversaj (se komunikitaj al la Prezidanto ĝis 1995 03 01).

BONVENON AL ĈIUJ!

# MORALA RAPORTO PRI LA JARO 1994

La unua jaro de la mandato de la nova Estraro, elektita en Olten, marto 1994, finiĝas per agad-bilanco kiun ni taksas pozitiva, ankaŭ en la spegulo de la jara spezkalkulo.

**1. Organoj.**

La kvaropa Estraro, elektita en marto, perdis jam en aprilo unu membron, pro la libervola demisio de s-ro Andy Künzli. Liaj taskoj de sekretario (protokolado kaj arkivado) estis provizore plenumataj de la aliaj estraranoj. Fine de januaro 1995, s-ro Angelo Mellini estis nomumita kiel nova sekretario. ***La Ĝenerala Kunveno estas vokita ratifi ĉi tiun nomumon, elektante s-ron Mellini al la Estraro.***

En junio, la Estraro alelektis ges-rojn Tazio Carlevaro (Tiĉino), Nicole Margot (Romandio) kaj Angelo Mellini (Alemanio), danke al kiuj formiĝis sesopa Centra Komitato.

Kvankam ne membro de la supre menciitaj organoj, s-ro Fritz Liechti, antaŭa vicprezidanto, estis ŝatata gasto ĉe la estrarkunsidoj pro sia ofico de redaktoro de SES-Informas.

Inter la pasinta Ĝenerala Kunveno kaj la nuna la statutaj organoj kunsidis entute tri fojojn.

**2. Statutreformo.**

La Estraro daŭrigis la internan konsultiĝon pri la statutreformo. Nur pri unu punkto la konsultiĝo estas finita: la jura sidejo de SES. Nuntempe ĝi estas ĉe la prezidanto, sed la Estraro proponas ke ĝi estu ĉe la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds (CDELI), kie ni gardas jam ĉiun oficialan akton de la Societo. Ĉe la prezidanto, aŭ eventuala komisiito, restas la korespondadreso. ***La Ĝenerala Kunveno estas vokita decidi pri la nova jura sidejo de SES.***

Pri alia punkto la Estraro ŝatus koni la opinion de la Ĝenerala Kunveno, kvankam sen devigo de apliko de tiu opinio: ĉu gardi du gvidajn instancojn (Estraro kaj CK) aŭ kunfandi ilin en unu. La kunfando garantius pli multe la reprezentatecon de la tri lingvoregionoj, kaj samtempe ebligus efektivan vivon por la Federa Konsilio, kiel plej vasta forumo de la svisa esperantistaro.

**3. Membraro kaj financoj.**

En 1994 la membraro kreskis je ĉ. 10% kompare kun 1993, malgraŭ forpasoj kaj eksiĝoj.

Akceptante la oficon, la nova prezidanto ricevis sur siajn ŝultrojn la negativan balaston de buĝeto kun deficito de 4.750,- frankoj. La Ĝenerala Kunveno rimarkos ke tiu deficito limiĝis je nur 618,- CHF, sen problemoj por la servoj al la membraro. Kaj por 1995 la prezidanto insistas, kune kun la kasisto, pri la aprobo de buĝeto en egaleco, daŭre sen redukto de la servoj, sen altigo de la kotizoj kaj eĉ kun altigo de la financa engaĝo por la informado. ***La Ĝenerala Kunveno estas vokita aprobi la bilancon kaj la buĝeton.***

**4. Informado kaj publikaj rilatoj.**

La nova Estraro planis specialan merkatikan seminarion, sub la gvido de fakulo (D-ro Marco Picasso). La seminario, dediĉita al la temo "Kiel vendi esperanton en Svislando?", efektiviĝis komence de januaro 1995 en Lucerno. Ĝi estis tre sukcesa, kiel raportas aliloke S-ino Sonja Brun. Ni antaŭvidas diskutojn pri la temo interne de la lokaj societoj, laŭ la ekzemplo de Laŭzana E-Societo (1995 02 20).

Prepare al la merkatika seminario, en septembro D-ro Giorgio Silfer partoprenis en grava kolokvo pri lingva juro en la universitato de Friborgo. Ni ricevis la plej freŝajn informojn pri la lingvopolitiko en Svislando kaj en Eŭropo. La Federa Konsilio devus esti la forumo kie debati pri la kontribuo de SES al la svisa lingvopolitiko. Ni emfazas, ke la partopreno de D-ro Silfer ebligis oficialan informon al la kolokvo ankaŭ pri la utiligo de esperanto kiel ilo por ĝenerala instruado.

La Estraro donis atenton al la eĥoj pri esperanto en la svisa gazetaro, kvankam ne tre sisteme: tio ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto ke agentejo Argus ne bone plenumis sian kontrakton kun SES. S-ro Claude Gacond estas komisiita protesti kaj peti kompensan rabaton.

Junularo Esperantista de Svislando ricevis la kutimajn mil frankojn, sed lastfoje kiel donacon: ekde 1995, konforme al la Akto 4, SES ne plu subvencios asociojn, sed nur iniciatojn, kaj nur en la kampo de informado kaj publikaj rilatoj. Tiucelaj petoj devos esti adresitaj al la prezidanto.

**5. Servoj.**

La membraro daŭre ricevas du periodaĵojn: SI por interna uzo, kaj LF por la kultura pliboniĝo. Krome, LF pruviĝas tre oportuna reklamilo, se oni volas montri al neesperantistoj belaspektan kaj altkvalitan publikaĵon. Tion interalie aprezas la diversaj PEN-Centroj en Svislando. Ankaŭ Pro Helvetia, subvenciante la ekspozicion pri la 25 jaroj de LF en Budapeŝto,

rimarkis la aŭspiciadon de SES. Tion ni devos eluzi okaze de konkretaj projektoj, proponeblaj de SES.

La regionaj semajnfinoj disvolviĝis tre sukcese en Lugano (februaro) kaj en Cully (septembro). Ĉi-lasta preparis al la merkatika seminario. Gratulon al la lokaj organizantoj, speciale al D-ro Tazio Carlevaro kaj F-ino Nicole Margot. La regiona semajnfino alemana koincidis ĉi-jare kun la merkatika seminario, ankaŭ brile prizorgata de la lucernaj gekolegoj, kaj unuavice de S-ro Angelo Mellini.

**6. Administrado.**

La rilatoj kun UEA (ekster la perado de la ĉefdelegito) estis prizorgataj precipe de la komitatano A, S-ro Didi Weidmann, kiu tamen ne ĉeestis la Universalan Kongreson.

La Estraro konsultiĝis kun li, kaj difinis la agadlinion por la reprezentanto de SES ene de la UEA-Komitato.

***La Ĝenerala Kunveno estas vokita elekti la UEA-komitatanon por la jaroj 1995-98.*** Kandidatiĝoj estas bonvenaj.

La Prezidanto vizitis diversajn lokajn societojn (en Ĝenevo, Laŭzano, Lucerno) kaj planas pliajn vizitojn.

SES partoprenis unuafoje en la ĝenerala Asembleo de KCE (1994 10 29), en la formala rolo de ano de la Kultura Komisiono. La SES-prezidanto mem estis elektita al la ofico de tagprezidanto. Ŝi cetere subtenis la proponon disigi la respondecojn de GEP kaj KCE: ĉi-lasta havas novan, tre bone funkciantan Estraron. La intereson de SES pri la institucioj en La Chaux-de-Fonds motivas ankaŭ la fakto ke nia societo havas sufiĉe grandan monsumon en GEP-konto.

**7. Perspektive.**

SES pli kaj pli karakteriziĝas kiel la svisa societo por la informado pri la fenomeno esperanto. Tiurilate ĝi kunlaboras kun KCE (kiel instrua kaj kleriga centro) kaj kun LF-koop (kiel eldonejo kaj transnacia referenco).

SES intencas firmigi sian alvokiĝon de intersocieta referenco, por optimumigi per siaj servoj la surlokan agadon.

SES plifortigas sian internan strukturon kaj intencas sekvi strategion de sanaj financoj.

SES povas kaj devas esti pli aktiva ene de UEA.

Ni invitas la Ĝeneralan Kunvenon aprobi ĉi tiun moralan raporton kaj la aneksan financan raporton.

Perla Martinelli, nome de la Estraro

La 2-a jardeko PSI


Pasko en Germanio

# 11-a Printempa Semajno Internacia

(Germana Esperanto-Asocio)

**14 – 21 aprilo 1995**

**Waldfischbach**
[valtfíŝbaĥ]
Palatinato (Pfalz), Germanio




Detalaj informoj estas riceveblaj
ĉe la redakcio de SES INFORMAS

## BILANCO de SES 1994

| JARKALKULO | BUĜETO 94 | KALKULO 94 | BUĜETO 95 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 8.000.– | 7.782.– | 8.560.– |
| Abonoj (sen membreco) | 500.– | 555.– | 610.– |
| Donacoj | 800.– | 537.– | 1.000.– |
| Donacoj Agado 2003 | 1.000.– | 715.– | 1.900.– |
| Interezoj SKA kaj GEP, malnetaj | 2.300.– | 1.950.50 | 2.100.– |
| Varbsumo disponebla ĉe CG | | | 1.500.– |
| **Enspeza sumo** | 12.600.– | 11.539.50 | 15.670.– |
| | | | |
| INFORMADO, PUBLIKAJ RILATOJ | | | |
| Informado, varbado | 4.000.– | 513.40 | 3.000.– |
| Omaĝoj kaj laborrimedoj | 100.– | 60.– | 50.– |
| Argus | 1.300.– | 1.316.40 | 1.200.– |
| Subvencioj | 1.000.– | 1.000.– | 1.000.– |
| Agado 2003 | 1.000.– | 0.– | 1.000.– |
| | 7.400.– | 2.889.80 | 6.250.– |
| SERVOJ | | | |
| Literatura Foiro | 5.000.– | 4.767.– | 5.450.– |
| SES Informas | 2.200.– | 1.932.80 | 2.000.– |
| Kunvenoj | 800.– | 397.– | 450.– |
| | 8.000.– | 7096.80 | 7.900.– |
| ADMINISTRADO | | | |
| UEA-kotizoj | 150.– | 216.20 | 220.– |
| Administraj kostoj | 1.500.– | 1.681.20 | 1.000.– |
| Bankelspezoj kaj diversaj | 300.– | 273.50 | 300.– |
| | 1.950.– | 2.170.90 | 1.520.– |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Elspeza sumo** | 17.350.– | 12.157.50 | 15.670.– |
| Gajno/Perdo | - 4.750.– | - .618.– | - 0.– |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Kapitalo (SKA + GEP)** | | AKTIVOJ | PASIVOJ |
| GEP, Konto 079 | | 36.489.10 | |
| Inventaro | | 1.00 | |
| SKA kuranta konto | | 23.335.85 | |
| SKA fonduso Agado 2003 | | 1.551.70 | |
| SKA + GEP (anticipa imposto) kaj ESV | | 682.70 | |
| Transaj eroj aktivaj kaj pasivaj | | | 615.– |
| *Kapitalo je 1994 01 01* | 62.063.35 | | |
| minus la jara malprofito | 618.– | | |
| *Kapitalo je 1994 12 31* | 61.445.35 | | 61.445.35 |
| | | 62.060.35 | 62.060.35 |
| **Rezerva kapitalo (SVB)** | | | |
| SVB, ŝparkonto | | 12.181.35 | |
| SVB (anticipa imposto) kaj ESV | | 136.95 | |
| *Rezerva kapitalo je 1994 01 01* | 11.927.– | | |
| plus interezoj malnetaj | 391.30 | | |
| *Rezerva kapitalo je 1994 12 31* | 12.318.30 | | 12.318.30 |
| | | 12.318.30 | 12.318.30 |

*Ernst von May, kasisto*

kooperativo de literatura foiro

La Kongresfako de Kooperativo Literatura Foiro afable petas vin informi viajn legantojn pri la sekva aranĝo:

*14a Internacia Literatura Forumo*
pri

# *AMO EN POEZIO KAJ EN PROZO*

okazos en
Gdansko/Pollando
inter la 15 - 19 julio 1995

kun interesaj prelegoj, riĉa kultura kaj distra programo, unutaga ekskurso

organizantoj:
LF-koop kaj
Junulara Kreema Klubo PLAMA

*Programkotizo (inkluzivas nur la programon, sen la ekskurso, tranoktoj kaj manĝoj) en svisaj frankoj:*

| | *ĝis 31a de marto* | *ĝis 20a de junio* | *poste* |
|---|---|---|---|
| *eks-socialismaj landanoj* | *10* | *40* | *60* |
| *aliaj* | *40* | *50* | *60* |

*tranokto kun tuttaga manĝo: ĉ.17 USD tago/persono*

*Pliajn informojn, aliĝojn bonvolu peti de*

*Kongresfako de LF-koop, c/o Esperanta PEN-Centro*
*Pf. 117, H-1581 Budapest, Hungario*

Kun antaŭdanko,
plej sincere salutas vin,

Judit Felszeghy, kongresfako

## VOKO EL MORTDANĜERO

De mia korespondantino, loĝinta en Kigali/ ĉefurbo de Ruando, antaŭ nelonge atingis min jena mesaĝo, per letero de la Ruĝa Kruco:

"Korajn salutojn. Kiel vi fartas?
Ĉe mi nenio funkcias. Mi estas en Zairio, kune kun miaj tri infanoj, kie ni multe suferas. Mi ne havas novaĵojn de mia edzo kaj la du aliaj infanoj. Ili eble mortis. Tie-ĉi mi estas sen laboro. Ni bezonus multe da aĵoj. Se vi havus eblecon, ĉu vi bonvolus sendi al ni vestaĵojn, ŝuojn, medikamentojn kontraŭ la disenterio, sapojn ktp?
Provu trovi por ni rifuĝejon ĉe vi.Ni estas ĉi-tie en tendaro kun pli ol 52000 personoj kaj ni vivas en tre malbonaj kondiĉoj. Okazas multe da mortoj pro la disenterio aŭ aliaj malsanoj. Korajn salutojn de via Floride. Mia adreso estas:
Floride Karuhimbi
Camp Inera, Zone 4, Quartier 40
Bukavu (Zairio). -DR-

Rimarko de la redakcio de "SI":
Laŭ letero de la Ruĝa Kruco, helpo ne estas ebla. Tamen mi opinias,ke eble kuraĝigaj leteroj el Svislando certe multe fortigus ŝin. La provo de sendado, eble de medikamentoj, estus pripensinda. -FL-

oo0oo

## KORESPOND-DEZIRO

Mi instruas bazan Esperantokurson al malgranda grupo. Nun ni ŝatus korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun geesperantistoj ankaŭ en Svislando. Koran antaŭdankon al skribontoj. Nia adreso estas:
S-ro Pekim Vaz, Caixa Postal 182, Bélem-PA,
BR-66017-970 (Brazilo)

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En restoracio Riehentorhalle.
23.3.20.00h Monata Kunveno: Ni fintradukos nian kvartetludon kaj ludos.
27.4.20.00h Monata Kunveno: S-ino Perla Martinelli, prezidanto de SES, paeolos pri la Seminario Luzern.

**BELLINZONA:**
ĉiam sabate en Viale Motta 32.
4.3.17.00h kaj 1.4.17.00h

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
7.3.19.30h kaj 4.4.19.30h

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
ĉiun vendredon 18.00 ĝis 19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**
En Institut Nacional genevois.
10.3.19.15h ĝenerala jarkunveno
7.4.19.15h Monata kunveno

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**
En Popoldomo, salono 7, chaudron 5.
6.3.20.30h ĝenerala asembleo, prokrastita je unu monato, pro programŝanĝo en februaro.
Antaŭanonco: En la Regiona Semajnfino en Cully, s-ro Georges Lagrange prelegos pri la strukturo de nia lingvo, pri kiu li estas fakulo, kiel tradukisto kaj verkisto.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**
8.3.14.00-16.ooh paroliga kunveno en Big Ben. Gvido Franz Brügger.
11.3.10.00h (sabato) ĝenerala kunveno de SES en hotelo Steghof.
23.3.20.00h "kial kaj kiel parencas eùropaj lingvoj"? Kun komparaj

tekstoj kaj aliaj ekzemploj.
12.4.14.00-16.00h paroliga kunveno en Big Ben. Gvido Franz Brügger.
27.4.20.00h en restoracio Simplon: Literatura vespero. Parolos Sonja Brun.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstr.18.
8.3.20.00h "per transsiberia fervojo al Pekino kaj Junulara Kongreso en Koreio (dua parto). Rakontos Veronika Pochanke.
Aldona informo: La 22-an de decembro 1994 nia klubanino, Veronika Pochanke, prelegis pri Esperanto kaj Esperanto-movado al lernantinoj de franca lingvo, en Berna gimnazio, invitita de ties instruistino. Partoprenis 12 knabinoj. La plej entuziasma el ili lernas diligente Esperanton kaj partoprenis jam Internacian Seminarion en Germanio, parolas kaj korespondas en Esperanto. Koran Gratulon.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
13.3.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse.
Ni vidos filmon pri Ĉinio.
27.3.19.00h Libera kunveno en Eisengasse 22, ĉe fam. Weidmann.
10.4.19.00h Monata kunveno: Lingva Kvizo, en Karl der Grosse.
24.4.19.00h Libera kunveno ĉe fam. Weidmann.

oo0oo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

**LA KASISTO INFORMAS**

En la dua duono de la jaro 1994 SES kaj AGADO 2003 ricevis la jenajn kontribuojn:

1. DONACOJ AL SES:
Amalie Veith 50.-, Gertrud Merz 35.-, A. Mellini 60.-

2. DONACOJ AL AGADO 2003:
Fritz Müller 10.-, Walter Kobelt 40.-, Gertrud Eggenberger 20.-, Claude Gacond 25.-, Jean-Jacques Lavanchy 100.-, Willy Rieser 10.-, Christiane Sixtus-Pott 50.-, Fritz Liechti 20.-, Werner Schaufelberger 25.-, Dieter Rooke 50.-, David Bühlmann 100.-, Bruno Graf 100.-, Alfred Maier 50.- Luciano Ortelli 20.-, Jaqueline Vasserot 10.-

Al ĉiuj donacintoj ni esprimas la plej koran dankon. -La SES estraro-

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 3/95 estas la 6-a de aprilo 1995.**

oo0oo